
# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k70.html



Nro 70a Aprilo/junio de 2006

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jaronerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**:Sur pentraĵo de Ganivet, ni fantaziu pri nia verda Kiĥoto, kiu tradukis liajn aventurojn, ĉar ni prezentas ĉinumere la leteraron inter li kaj la alia kiĥoto, S-ro Manteka, kiu permone ebligis la eldonon de tiu ĉefverko de universala literaturo, en Esperanto.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Manuel Pankorbo,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

## Enhavo

Redaktore: Don Kiĥoto de la Manĉa ........................ 3
Informas la prezidanto ........................................... 4
Leteraro kiu okazigis la esperantan version ........... 5
La Faraono: ĉapitro 18-a ....................................... 22
La 65-a Hispana Kongreso de Esperanto ............ 24

Redaktore

# Du kiĥotoj

Antaŭ kvardek jaroj laŭ ĵus mortinta verkisto kaj tradukisto Fernando de Diego estis ĵus fininta traduki la plej faman hispanan verkon, ***Don Kiĥoto de la Manĉo***. Sed estis problemoj por publikigi ĝin. Estas korespondado pri tiu afero, kiun nia samideano Rodolfo Canet, de Alikanto, havigis al ni por ke ni publikigu ĝin, tiel fiksante tiujn historiajn dokumentojn en la havaron de la esperantistaro.

Pro tio, ke indas bone legi ĝin, ni elektis eksterordinare grandan liter-tipon ĉifoje, tiel ke oni povos legi la leterojn komforte. Tio, tamen, ne permesis aldoni al ni aliajn interesajn artikolojn, kiujn ni devis lasi por la venonta numero de ***Kajeroj el la Sudo***. Eĉ la ĉapitron ĉinumeran, 18-an, de ***La Faraono*** ni ne povis aldoni komplete. Tio igis nin inkluzivi nur la duonon de la ĉapitro. Ni kompletigos ĝin la venontan numeron, kune kun la sekvantan ĉapitron.

Dekstre ni prezentas foteton, kie oni vidas S-on Mantekan, dekstre de elstara esperantisto, Rodolfo Kanet', je inaŭguro de la Strato Esperanto de Benidormo, urbeto de Alikanto, je la jaro 1973.

Mi esperas, ke la legantoj ĝuos konante la detaletojn solvendajn pri la eldono de tiu literatura juvelo, kiun esperantistoj dise tra la mondo povas ĝui nun danke al la laborego de Fernando de Diego, sed ankaŭ danke al la intereso kaj klopodo de Miĥaelo Manteka, kiu malavare proponis grandan kvanton da mono tiuepoke, sep cent mil pesetoj, por ke tio realiĝu. Kaj ankaŭ danke al Fundación Esperanto, kiu helpis finance al la projekto.

Elkore,

*Jesuo*



# Informoj de la prezidanto

Estimataj samideanoj.



Somero alproksimiĝas, kaj la esperantistaro havas la eblecon renkontiĝi en multaj kongresoj, kaj alitipaj renkontiĝoj!

SAT kongresumos en Beogrado, kun malmultekostaj duontagaj ekskursoj, ekzemple la vizitado al ĉokoladofabriko kostas nur 2 eŭrojn, aŭ la vojaĝo al urbo Smederevo kostas nur 7 eŭrojn (kun vespermanĝo), aŭ la vizitado de ĉina bazaro unu eŭron, aŭ la vizitado al Monto Avala nur du eŭrojn.

Se vi ne havas sufiĉe da mono kaj ne konas Beogradon, SAT kongresumos en tiu bela ĉefurbo.

UEA kongresumos en Florenco, kaj preskaŭ ĉiu numero de ***Esperanto*** parolas pri la kulturo de Italio aŭ la kongreso.

***Kajeroj el la Sudo*** parolas pri Don Kiĥoto danke al samideano Rodolfo Kanet'. ***Kajeroj el la Sudo*** publikigas *la sekretajn paperojn de Don Quijote*, la malgrandan historion pri la publikigado de ***Don Quijote*** en la esperanta lingvo.

La legantoj povas koni tion, kiu estis Manteka, aŭ kiu estis De Diego, aŭ kiom da mono kostis la tradukado en la esperantan lingvon.

La estroj de la Esperanta movado en Hispanio kiam ili devis fari donacon, tion ili faris, ĉar estos la granda sukceso de la literaturo de la esperanta movado en Hispanio.

La Esperanto-Movado povas paroli pri la Universala Kongreso kiel la kongreso de Barselono aŭ la Universala kongreso en Madrido, sub la diktaturo, aŭ la Universala , aŭ la kongreso en Valencia, sed la granda sukceso ja estis ***Don Quijote***.

En la venontaj numeroj ***Kajeroj el la Sudo*** publikigos artikolojn pri la infaneco en Thailandio aŭ la instruado en Hispanio.

*Johano Antono,*
*Prezidanto de HALE*

# Don Kiĥoto de la Manĉo:
## Leteraro, kiu okazigis ties esperantan version

*Antaŭ kelkaj semajnoj samideano Rodolfo Kanet diris al mi, ke li havas leterojn, kiujn sendis unu la alian S-roj Fernando de Diego kaj Miĥaelo Anĝelo Manteka rilate al publikigo de la versio de* **Don Kiĥoto de la Manĉo**, *fare de la unua.* **Kajeroj el la Sudo** *fiere prezentas por la unua fojo tiujn ĉi historiajn leterojn, por ke la estonto sciu pri la eldeveno de tiu ĉi esperanta versio.*

*Saragoso, la 24-an de novembro de 1976*

*Sr-o Miguel Manteca López,*
*Plaza de los Luceros, 7,*
*Alikanto.*

*Tre estimata s-ano!*

*F-ino Gastón informis min, ke vi destinis 15 000 pesetojn kiel kontribuon al pago de eventuala eldono de mia Don Quijote en Esperanto.*

*Mi profunde dankas vin pro via decido, kiu rivelas vin konscia kaj fervora esperantisto, sed tial, ke nek la hispana Esperanto-Federacio, nek iu ajn alia Esp.-organizaĵo turnis sin al mi, private aŭ oficiale, por trakti la kondiĉojn de tia eldono, nek ekzistas do ajna konkreta eldonprojekto aprobita de mi.*

*Ĝis nun mi donacis mian Esperantan laboron, neniom mi ricevis aŭ ricevos por* **La Lando de Alvargonzález, Cigana romancaro, Kun sopira koro, La arbo de la scio, Doña Bárbara**. *Nu, ne gravas. Sed* **Don Kiĥote** *estas io aparta, kies tradukon mi vendos nur kontraŭ solida kaj alta pago: 10 000 dolarojn aŭ kontraŭ ekvivalenta sumo en alia ajn okcidenta valuto.*

*Mi konscias, ke tiu postulo certe kondamnas mian version ŝirmi eterne en tirkesto, sed mi ne inklinas malklare doni la produkton de giganta kaj (permesu, ke mi montriĝu malmodesta) nesuperebla laboro. Se mi estis tiel freneza, ke mi dediĉis plurajn jarojn de mia vivo al la cerbo-muela kaj konzuma tasko traduki* **Don Quijote**, *eble ie en la mondo ekzistas mecenato same freneza, kiu ne domaĝus perdi konsiderindan sumon da mono nur por la plezuro enmondigi*

*la faman klasikaĵon en Esperanto. Se tia* **rara avis** *ne ekzistas, mi timas, ke* **Don Quijote** *vivos en Esperanto nur por la ĝuo de sia tradukinto kaj de liaj amikoj.*

*Sed refoje mi dankus vin pro via bela iniciato. Se ekzistus nur 100 esperantistoj, kiuj kontribuus ĉiuj po 15 000 pesetoj, estus eble pagi la esperatan manuskripton kaj eldoni la libron. Tamen, mi estas certa, ke vian ekzemplon apenaŭ sekvus ne pli ol 20 samideanoj.*


*Mi kaptas la ŝancon por kore saluti vin, kaj meti min je via dispono,*

***Fernando de Diego.***

*Saragoso, je la 25-11-1976*

*S-ro Miguel Manteca*
*Plaza de los Luceros, 7*
*ALIKANTO.*

*Estimata amiko! Mi ricevis vian leteron kun la ĉeko por 15 000 pesetoj, kiun mi enkaŝigis en la Ŝparkason de Fundacio ESPERANTO, por la konto, kiun HEJS iniciatis kun la celo subvencii la eldonon de Don Kiĥoto en Esperanto.*



*Tuj mi informis pri via sendon al S-ro Miĥaelo Sanĉo Izquierdo kaj Viktor Ortiz, ambaŭ anoj de la Patronato de la Fundacio, kaj al Fernano de Diego, kiu diris, ke li skribos rekte al vi.*

*Mi danksas vian donacon, nome de S-ro Miĥaelo kaj de Viktor, kaj je mia nomo propra, kaj post la kunveno kiun je la monato de januaro okazigos la Patronato, kaj en kiu ni pritraktos la aferon, mi informos al vi pri tio, kion oni decidos.*

*Fide, mi diros, ke ŝajnas al mi tre malfacile, ke la eldono de* **Don Kiĥoto** *aperu en Esperanto, ĉar la kondiĉo, kiun Fernando de Diego metas por ĝi estas, ke oni pagu nun la rajtojn de aŭtoro, kiu je mia opinio estas tre alta. Se tiuj kondiĉoj ne estus, li preferas, ke la verkon oni ne eldonu.*

*Antaŭ tiu kunveno, mi intencas informiĝi pri literaturaj etosoj –*

*neesperantismaj— pri tio, kion oni kutime faras pri tiuj ĉi eldonoj, devante pagi rajtojn aŭtorajn –ĉikaze tradukajn—. Dume, la nura afero, kiun mi scias estas, ke tio ĉi estas tro multe da mono, kiu aldonate al la kosto de printado, kaj tiel plu, por eldoni ĝin nun.*

*Fernando diris, ke li klarigus tion al vi. Mi preferas ne ekspliki pli, dum mi ne estas informita, ĉar mi opinias, ke estas tro multe da mono.*

*La kotizo al* **Horizonto** *estas same por 1977, nome 500 pesetoj jare.*

*Mi dankas multe viajn frazojn en la Kongreso de El Ferrol, rilate al mi; same kiel la amikoj esperantistaj sendube devas opinii, kiel la terkulturistoj de mia lando, ke* bonon kial diri*, neniu rakontis al mi.*

*Salutas,*

**Inés Gastón.**

*Alikanto, la 5-.an de decembro de 1976.*

*S-ro Fernando de Diego.*

*Mia tre estimata samideano! Ricevinte la honoron de via letero datumita la 24-an pasintan, mia ĝojo estis senmezurebla. Sed baldaŭ ĝi ŝanĝis en penon, legante ĝian strangan enhavon.*

*Kion mi povas diri pri via plenrajta decido demandi 10 000 dolarojn pro via traduko de Kiĥoto? Artaĵoj neniam estas multekostaj aŭ malmultekostaj. Ĉiun kazon konkretan ekzistas falsa samvaloro inter io dia (artaĵo) kaj subhomaĵo (mono), kaj unu kaj alia kontraktantoj interkonsentas tiun strangan ŝanĝon.*



*Kial vi ne petas cent mil dolarojn por tiu traduko? Mi asertas, ke mi ne trovas tion troiga. Ili estas du aferoj tiom diversaj, ke al tiu,kiu taksu unun pli ol la alia, ĉiu kvanto ŝajnos nesufiĉa. La problemo estas trovi la dolarojn, kiun vi petas. Vi bone faris*

*petante dolarojn, tio estas, la kerno de la valutoj, aŭ, kio estas same, la kvintaesenco de rubo.*

*Mi opinias, ke vi devus averti plej eble kiel frue al HEJS por ke ili nuligu la kotizkolekton komencatan, ĉar estos ĥaoso redoni la donacojn, kaj estas klare, ke oni ne povos kolekti la 10 000 dolarojn. Mia frato Manŭel', loĝanta en Tenerifo, estis sendonta aliajn 15 000 pesetojn, kiel mi, sed mi avertos lin, ke li ne tion faru, ĉar mi konsentas kun vi, ke eĉ 20 esperantistoj hispanaj aŭ sudamerikaj ne donacos tiun kvanton.*

*Mi ne estas psikologo, sed mi opinias, ke la problemo ne estas esence mona. Eble vi indigniĝos, ke ni iluziiĝis pri via verko, sen preskaŭ kalkuli kun vi. Tio ne estas vera rilate al mi. Mi jam diris al Ines per mia letero, ke mi intencis skribi al vi dum multe da tempo, sed mi ne havis vian adreson. Mi konsideras vin la ĉefa esperantisto hispanparolanta, sed mi ne ankoraŭ havis la honoron koni vin en la kongresoj de Esperanto, kiujn mi partorpenis. Kiam mi sciis, ke vi jam tradukis la Kiĥoton, mi pensis, ke indis, kiel hispano kaj esperantisto, ke mi klopodu ekonomie vidi ĝin publikigita, kaj tiel mi diris al mia frato, kiu parolis al S-ro Régulo Pérez pri ĝi.*

*Tiom mi deziris rapidigi tiun eldonon, ke apenaŭ mi vidis la malfermon de HEJS pri la kotizo, mi sendis tiujn pesetojn por instigi*



*aliajn fari same, pikante siajn poŝojn plej eble kiel forte. Vi ja scias, ke esperantistoj ne estas ĉefe trajtigitaj –danke al Dio— pro siaj povoj ekonomiaj.*

*Mi ŝategos paroli kun vi por paroli pri ĉio tio kaj ke vi klarigu al mi vian sintenon. Ĉu vi tradukis la Kiĥoton pensante, ke ĝi donos al vi multe da mono? Ĉu havis ĝin Kalman Kalocsay, ĉu la propra Unamuno, verkante en lingvo por du cent milionoj da estaĵoj? Gloro kaj mono estas aferoj tre malsamaj. Vi diros, ke vi vidas nek unu nek la alian. Mi ne scias pri la sinteno de la Estraro de HEF al vi, sed eĉ supozante, ke ĝi ne estis esprimopova, mi asertas al vi, ke ni ĉiuj esperantistoj hispanaj fieras pri vi.*

*Internacie oni jam agnoskis vian meriton farante vin akademiano. Ĉu vi opinias, ke vi atingos multe pli el tiu amaso da malfeliĉuloj bonintencaj, kiuj estas ni esperantistoj? Jen Zamenhof mem, kiu tiom bone respegulas nin. Ni imitu lin je liaj simpleco kaj klara juĝo.*

*Kial vi volas venĝi de Esperanto, malebligante la eldonadon de unu el siaj plej bonaj verkoj? Vi metu la kondiĉojn kaj provizu la rimedojn, por ke neniu alia profitos vian meritoplenan klopodon, sed vi ne neu al la tuta esperantistaro la plezuron juĝi vian verkon. Mi proponas min mem reprezenti vin senpage je ĉiu demarŝo, kiu ĝenos vin fari tiucele. Mi imagas perfekte vian duran laboron pri artisma traduko (Mi juĝas laŭ tio, publikigita je* **Horizonto***). Mi komprenas, ke vi ribelu kontraŭ tiu, kiu supraĵe pretendu alproprigi ĝin, same kiel pri la aliaj verkoj, kiujn vi citas en via letero. Sed, ekzakte pro tio, ĉu estos malpli bonŝanca* **Don Kiĥoto** *ol* **S-rino Barbara***? Estu vi ankaŭ kavaliro marŝanta, kaj saltu super la kardoj, kiuj volos piki vin.*

*Pardonu tiun ĉi paroladon. Mi nur povas pensi proponi al vi mian tegmenton kaj mian panon, pruvi vin kiom multe mi estimas vin. Venu, kun la tuta konfido, pasigi la tempon, kiun vi volos sub tiu ĉi levanto sunkisata, kaj vi konos nian grupon esperantistan, kiu dorlotos vin kiel vi meritas. Se poste vi ankoraŭ pensas, ke ĝiaj anoj devas suferi la punon, kiun vi volas meti sur nin, vi faru.*

*Vere proponas sin al vi, kun ĉia mia respektema korinklino,*

**Miĥaelo Manteka**

*Saragoso, je la 7-a de decembro de 1976*

*S-ro Miĥaelo Manteka*
*Placo Los Luceros, 7*
*ALIKANTO.*

*Estimata amiko!*

*Mi ĵus ricevis vian leteron de la 5-a kaj mia respondo devas esti necese longa, ĉar tion postulas viaj tre interesaj prikonsideroj rigarde al temo de La Kiĥoto.*

*Mi dezirus antaŭdiri, ke, kiam mi komencis traduki la gravan novelon, mi faris tion kun nenia aspiro aŭ intenco primona. En tiu libro mi vidis nur defion al eblecoj de Esperanto kaj dum kelkaj jaroj, laborante ofte ĝis dek kvar horojn tage, mi povis pruvi iom post iom, ke nia lingvo kapablas sufiĉe bone superi la klopodon. Kredu min, ĝi estis tre laciga etapo, en kiu mi uzis la plej bonon el mi mem, kaj mi sukcesis superi ĝin danke al entuziasmo kaj terura persistado. Sed ĝi estis ankaŭ etapo feliĉa, ĉar mi devigis min kvoton tre altan, kaj mi kredas, ke mi sukcesis venki ĝin: ĝi devos esti Kiĥoto, kiu egaligos, almenaŭ, tiujn tradukojn ekzistantajn en aliaj lingvoj; kiu ne estus por la leganto teda kaporompilo, kaj kiu havos stilon simplan kaj naturan ene de rigora fideleco al hispana teksto; kiu ne rezultu karikaturon nekompreneblan, sed respegulo pova de la spirito kaj formo de la genia novelo de Servanteso. Sen falsa modesto (kaj ankaŭ sen banala aroganteco,ĉar mi estas la plej senkompata kritikanto de mia propra verkaro: ĉu vi povas kredi, ke kelkajn el la romancoj de* **Cigana Romancaro** *mi verkis pli ol dudek fojojn, ĝis kiam mi atingis la punkton de perfekteco, kiun la originalo postulis?), mi certas, ke mi atingis tion, kion mi celis.*

*Nun vi petas min per via letero, ke mi ankaŭ estu kavaliro marŝanta. Mi klarigu ĝis kiu punkto mi jam estis. Profesie mi laboras kiel tradukisto de la angla kaj la franca. Nu, ensorbita kaj kaptita de de Don Kiĥoto, mi pli kaj pli malzorgis pri mia profesia laboro, mi pretekstis por rifuzi kelkajn titolojn, kiujn mia eldonejo —Alianza Madrid— proponis al mi, kaj tiu malproksimigo kaŭzis, ke la rilatoj laboraj kun la entrepreno finfine malaperis. Kiu, sekve, povas superi*

*min pri kiĥotismo?*

*Tiam, kiam mi petas 10 000 dolarojn por la Kiĥoto (vi rekte pravas, ĝi estas arbitracia kvanto, kiu povus esti multe pli alta), tion, kion mi petas estas vere parto, kaj ne granda, de la mono, kiun mi ne povis gajni pro tio, ke mi dediĉis min al tiu tasko plenplena da intima persona kontentigo, sed ruiniga ekonomie.*

*Sed la afero ne haltas tie, ĉar pro pura kiĥotismo mi ne nur malavantaĝis min, kaj daŭre malavantaĝas, pri ekonomio, sed ankaŭ ene de mia hejmo mi devis elteni la kritikojn kaj malbonajn humurojn –logikajn kaj pravajn—, el ŝia vidpunkto— de mia edzino mem, kiu ne komprenas, ke mi perdu mian tempon sen videbla pago, pri ĥimeroj. Ĉu vi memoras la riproĉojn de la dommastrino kaj la nevino de Don Kiĥoto? Nu, ankaŭ pri tio mi similas lin.*

*Kompreneble, mi nek pentas nek peziĝas pro tio, ke mi dediĉis kelkajn jarojn al mia traduko. Mi rekomencus traduki ĝin milfoje, se milfoje mi pripensus la saman kazon je la samaj cirkonstancoj.*

*Kaj nun vi diras en via letero tre subtilan pripenson, kiu alproksimiĝas la celon. Ne estas, ke mi indigniĝas kontraŭ iu ajn, eĉ mi volas venĝi de Esperanto. Mi tre bone konas nian etoson, kaj nacie kaj internacie, kaj mi neniam iluziiĝis pri ili. Tio, kio okazas, estas ke mi sentas scivolemon vidi ĉu ekzistas ie ajn alia Kiĥoto –sola aŭ kunigita—, kiun ne ĝenu oferi parton de sia mono por realigi laboron tiom grava, pro kiu mi, je mia parto, jam oferis diverse, ne nur ekonomie.*

*Kaj, aliflanke, ĉu ne estas* **superkiĥotaĵo** *havi pretigita la libron Don Kiĥoto kaj starigi tiajn kondiĉojn por ties publikigo, kiuj signifos, praktike, lasi ĝin neeldonita?*

*Vi opinias, ke laŭ la kriterio de praktika homo, tio povus esti idioteco, sed el la momento, kiam mi komencis traduki la libron, aŭ ĉio estas idioteco, aŭ ĉio estas kiĥotismo en tiu afero.*

*Mi ne estas homo tre sensitiva al laŭdo, kaj al honorigo. Pro tio mi ne zorgas ĉu la estraro de HEF okupiĝas, ĉu ne okupiĝas pri* ***Don Kiĥoto****.Tio, kion mi taksas maleleganta estas, ke se ĝi okupiĝas pri tio, kiel pri la kotizo, ĝi faru sen eĉ konsulti al mi. Kompreneble, mi*



**Geedzoj Manteca Cano, mecenatoj de Esperanto, dum vizito al Lucerno, Svisio.**




**Ĉe oficiala inaŭguro de strato Esperanto de Benidormo, je 1973.**

*dankas la bonan intencon, sed, mi ripetas, la proceduro ne estas la plej trafa.*

*Kaj se ni parolas pri HEF, vi komprenu, mia estimata amiko, ke ne estas mia rolo peti, ke oni nuligu la kotizon iniciatan. Ili mem riparu sian fuŝon.*

*Ne volas mi fini sen denove danki, profunde, vian belan geston oferi 15 000 pesetojn por kontribuado al entrepreno vere kiĥoteska. Mi esperas, kaj deziras, ke vi ne havu problemon rehavi ilin.*

*Kaj rilate al sindonema propono de viaj servoj kaj gastemo ĉe via hejmo kune kun tiu de la grupo loka, mi ne trovas vortojn sufiĉajn por esprimi mian plej emocian dankon. Sciu, ke ĉi tie en Saragoso vi ankaŭ havas vian hejmon, kaj ke por mi estas tre granda kontentigo rilatiĝi al vi, eĉ ser perpoŝte; via letero rivelis, ke ne nur homoj bonintencaj, sed ankaŭ inteligentaj kaj sagacaj ekzistas en la movado hispana. Sed, mi certas, ne mankos ŝancoj, en kiuj ni povos trakti unu la alian persone.*

*Transdonu miajn plej elkorajn salutojn al via frato Manŭel', pri kiu mi konservas tre agrablan memoron de miaj jaroj kanariaj, kaj kun miaj plej bonaj deziroj pri tio, ke vi pasigu kune kun via familio Feliĉajn Kristnaskon kaj Novan Jaron, vi sciu min senkondiĉe je via dispono,*

**Fernando Diego**

*Madrido, je la 5-a de januaro de 1977*

*S-ro Fernando de Diego,*
*Saragoso.*

*Mia estimata amiko!*

*Decidite, ni jam simpatiis perletere, almenaŭ vi al mi.*

*Mi deziras, unue, malfari eraron, kiun mi ŝajnas eltiri el viaj linioj: tiu, kiu malfermis la ekabonadon al* Operacio Kiĥoto, *estis HEJS (Hispana Esperanto Junulara Sekcio), kiu estas la juna branĉo de la Federacio, kiu ĝuas sufiĉe da sendependenco, kaj eble ili ne konsultis la Estraron de HEF (Hispana Esperanto Federacio).*

*Sed mi volas paroli pri alia afero. Mi estis pensante pri la enhavo de via lasta letero, kaj mi aprobas ĝin tute, same kiel la unuan. Vi pravas pri via scivolo vidi ĉu aperas esperantisto preta proponi duonon de tio, kion vi jam provizis. Kaj ni ne diru pri la kontento, kiun vi sentus dirante al via edzino:* jen 10 000 dolaroj! Do mi ne estas misgvidata.

*Nu, sinjoro, sendube Kiĥoto frenezigas, aŭ idiotigas, kiel vi diras. Post mia lasta parolaĉado pri kraĉinda valoro de mono, ne eblas alia sinteno krom sciigi vin, ke mi pretiĝas sendi al vi tiun kvanton, tiam, kiam vi jam anoncu la publikigon de la libro, per certa maniero, kaj ke mi fiksas ĝian ekvivalenton en pesetoj, kiu estus la uzata mono, evidente.*

*Mia deziro estus, ke ie en la verko oni konstatigu tiel:* Patronigita tiu eldono de la geedzoj Manteca Cano. *Ĉar la nomo de la tradukisto estos ankaŭ en sia loko, ni tiel estus unuigitaj de nia kiĥotismo, kiu sonas pli bone ol la alia ekvivalento, kiun vi mencias.*

*Mi neniam publikigis ion ajn, kaj mi ne komprenas pri tiu afero, sed mi kuraĝas proponi vin, ke, je mia modesta kompreno, la eldono devos esti zorgita plej eble kiel bone, pro tio, ke* al granda sinjoro, granda servisto. *Mi konsideras grava, ke ĝi havu bildojn, literojn klarajn, bonan paperon, kaj tiel plu. Oni donacis al mi hispanan eldonon, kun bildoj de Dalí (estus pli bone kaj malmultekoste uzi aliajn bildojn pli klasikajn), kiuj helpas la kontentan legadon. Ĝi konsistas el du volumoj grandaj, malmulte pezaj, kiuj havas paperon nebrilan kaj malpezan, kiun mi konsilas al vi, ke vi provu kontroli, ĉu oni povas kopii tion. Mi ne havas ĝin ĉi tie, do mi ne povas diri al vi pri la eldonejo.*

*Vidu vi Gesinjorojn Miĥaelon Sanĉon Izquierdon, Inés Gaston, Ortiz, etc., kaj ni vidu, ĉu ili ekas la entreprenon plej eble kiel frue. Mi sendos vin la pesetojn tuj, kiam vi konsideros, ke la aliajn malfacilaĵojn oni jam venkis, kaj vi petos min, konscia pri tio, ke la afero progresas.*

*Mia propono nek estas sekreta, nek mi deziras, ke oni publikigu ĝin. Vi povas elekti tiel, kiel vi konsideru plej konvene, malkovrante tiujn aŭ al aliaj personoj, ĉion, aŭ parte da ĝi, citante aŭ ne mian*

*nomon. Mi nur provas faciligi la eldonon; kaj por tio mi ne kredas, ke necesas, ke oni parolu pri mi, krom –iam— tiu referenco indikita, kiu proponas al mi mia amo por mia edzino. Nia mono estas komuna, kaj pro tio, ke ŝi kontribuas, mi trovas elemente juste, ke oni diru.*

*Ĝis nun neniu scias ion pri tio, ĉar ankaŭ estas elemente, ke vi estu la unua. Al mia frato Manŭel' mi mendis demarŝon informan pri Régulo Pérez, kiu konsilis, ke oni eldonu ĝin en Madrido aŭ Barselono, kie ĝi kostos malpli ol en lia malgranda printejo. Li kalkulas maksimume pri du mil kopioj, kaj li kredas, ke ĝi kostos ĉirkaŭ 600 000 aŭ 700 000 pesetoj en bona eldono, sed sen bildoj.*

*Kiel vi vidas, per mia donaco, por venki la unuan obstaklon (tre legitima, kiel mi ĉiam agnoskas) ne ŝajnas, ke la entrepreno estas solvita. Vidu vi kiel solvi la aliajn punktojn. Ĉu ne povus* **Horizonto** *okupiĝi pri la eldono, komencante per ĝi novan eldonejon? Mi kredas, ke ĉiuj ni ŝatus, ke Hispanio estus, finfine, kolono grava en la Esperanta Movado.*

*Mi restas esperante viajn novaĵojn, kaj dume vi ricevu kun via edzino la korinklinon de ĉi tiu samideano, kiu esperas koni vin iam, kaj esti bona amiko via,*

*Miĥaelo Manteka*

*P/s.- Mi revenos en Alikanton baldaŭ.*



*Saragoso, la 12-an de januaro de 1977*

*S-ro Miĥaelo Manteka,*
*Plaza de Los Luceros, 9*
*ALIKANTO.*

*Estimata amiko!*

*Mi kredas, ke kiam oni verkos la historion detalan de la hispana esperantismo, viaj leteroj de la tagoj 5-12-76 kaj 5-1-77 kaj tiuj miaj de 24-11-76 kaj 7-12-76 staros en tiu historio kiel punkto de komenco de evento, kiu sendube elstaros, kaj havos ĉiajn profitajn sekvojn por nia lingvo: la eldono de* **Don Kiĥoto** *en Esperanto.*

*Mi ne scias kiel esprimi mian dankon. Ke kiĥoto en sia vojo alian kiĥoton trafu estas apenaŭ antaŭvidebla, kaj eĉ ne la fruktodona inventokapablo de Servanteso povis imagi tiun eblecon.*

*Mi esperas, kaj deziras, ke via ofero ekonomia ne estu tiel finfine, se la propagando kaj la distribuado de la libro realiĝas per maniero inteligenta kaj sinsekva. Diru al mi tion, kion vi opinias pri la papero, la printaĵo, la litertipoj kaj la formato de* **Doña Bárbara**. *Baze al ili mi petos S-ron Boloix du bilancojn: la unuan por 2 000 kaj la alian por 2 600 kopioj. Plej bone estus inkluzivi en la eldonon la bildojn de Gustavo Doré, sed tiam la kostoprezo plialtiĝus ĝis la nuboj.*

*Kiam Boloix diru al mi la bilancojn, mi sendos al vi, por ke vi pristudu kaj decidu ĉu, malgraŭ ĉio, vi deziras, ke la libro havu bildojn. Mi opinias, ke la la kalkulo de Régulo Pérez alĝustiĝas sufiĉe al realo, sed konvenas agi rapide por gajni tempon al inflacio. Mia konsilo estas eldoni la libron en Saragoso, ĉar la printejo de Boloix havas laboristojn kompetentajn kaj familiariĝintajn kun Esperanto, krom la granda avantaĝo, ke mi mem korektos la printprovojn per la zorgo kaj poluro, kiujn vi povas imagi.*

*Konvenas, ke la litertipo estu iomete granda, kiel tiu de* **Doña Bárbara**, *ĉar legantoj de esperanta literaturo kutimas esti homoj veteranaj, kies vidkapablo, ĝenerale, ne estas tro akuta. La libro estus rekomendeble eldoniĝi en unu sola volumo. Ĝi estus pli malmultekosta kaj havus pli facilajn distribuadon kaj kalkulon.*

*Kompreneble,* **Don Kiĥoto** *en Esperanto bezonas enkondukon, ne tro grandan, kiu orientu la leganton, aparte tiun fremdan, pri la trajtaro de la verko, kaj la personeco de la aŭtoro. Tiun enkondukon mi mem redaktos volonte, je la maniero de tiu, kiun mi faris por* **Doña Bárbara**. *Kvankam mi estas ŝarĝita de laboro –mi tradukas nun en la anglan longan kaj komplikan verkon por la Centra Banko de Venezuelo—, mi ekos la aferon tuj. Sed eble Régulo Pérez volus verki tiun enkondukon, kion mi ankaŭ ŝategus. Ĉu vi ankaŭ opinias, ke mi konsultu lin pri tio?*

*Mi ne antaŭvidas ian ajn obstaklon por la apero de* **Don Kiĥoto**. *La demarŝoj burokratiaj, kiujn oni devos solvi, estas pura rutino kaj pri ili estas tre lerninta Inés Gastón. Vi ne forgesu, ke tri el miaj*



*tradukoj en libroformo estis eldonitaj en Saragoso de Boloix.*

*Kiam ni jam aprobis la bilancon kaj trajtojn de la libro, kiam ni havos la permeson de la administracio kaj ĉiuj oficialaj vojoj estos malfermaj al ni, kaj kiam la linotipoj komencos labori, tiam mi kredas, ke estos la momento ricevi la salajron por mia laboro. Mi komprenas, ke mi ne ricevos eĉ unu centonon aldonan po la reviziado de provoj, kaj por la verkado de la enkonduko, se tion ĉi mi mem devos fari finfine. Je la nuna kurzo oficiala, je rondigitaj nombroj, 10 000 dolaroj estas 700 000 pesetoj. Se vi deziras, ke ni faru ian kontrakton por ke vi sekuriĝu kontraŭ ia hazardo, kiu povus malebligi la eldonadon de la libro, vi mem redaktu tiun dokumenton. Por tiu sumo mi renoncos ĉiun rajtojn, kiuj povus esti miaj kiel aŭtoro de la traduko, kaj ili pasos al via povo.*

*Je aŭgusto de la lasta jaro mi estis en Pollando kaj en mia vojaĝo mi kolektis serion da impresoj, kiujn mi titolis per* **Pollando, con amore** *kaj per kiu oni povas pretigi paroladon en Esperanto, kiun mi kredas, ke ne desapontus. Kaj mi opinias, ke se la Centro Esperantista de Alikanto invitus min prelegi tiun paroladon, mi havus la ŝancon bonegan koni vin persone kaj interŝanĝi impresojn pri nia komuna kaj kiĥoteska laboro. La afero povus esti ĉirkaŭ fino de februaro, se vi trovas mian ideon akceptebla.*

*Kiam la laboro pri* **Don Kiĥoto** *komencos realiĝi, tio estas, kiam la printejo ricevos la manuskripton, mi kredas, ke estos la momento konvena por diskonigi publike la fakton per ĉiuj esperantaj publikaĵoj, per granda teksto, kiun mi mem verkus, kaj –kial ne?—, disdiri ankaŭ per ĉiuj rimedoj naciaj. Estas evidente notigi, aliflanke, ke la sindona gesto via kaj de via edzino devas resti registrita, kiel ĝi indas, en honora kadro en nia* **Don Kiĥoto.**

*Vi pardonu, se mi ŝajnas iom malkohera en ĉi tiu letero, kaj se, plejparte, mi faras nenion krom ideoskizon. Sed ni devas konkretigi iom post iom tion, kion ni devos fari por ke ĉio finu je deziroj niaj.*

*Mi ripetas, kaj al vi kaj al via edzino, mian plej profundan kaj emocian dankon. Kaj vi sciu min senkondiĉe je via dispono,*

**F. Diego**

*P/D.- Mia telefono estas 23-76-88. Kiu estas tiu via?*

*Saragoso, je la 1-a de februaro de 1977*

*S-ro. Miĥaelo Manteka*
*Plaza de los Luceros, 7,*
*ALIKANTO.*

*Mia kara amiko!*

*Mi petas, pardonu, ke mi tiom prokrastis mian respondon al tiu via de la 16-1-77, sed mi volis diri novaĵojn konkretajn pri la stato de nia envojigita* **Don Kiĥoto**, *kaj mi fiere povas diri, ke la demarŝoj, kiujn mi faris antaŭ la patronoj de la Fundacio Esperanto (vi ricevos novaĵojn rekte de tiu institucio) havis feliĉan finon por nia entrepreno.*

*Kvankam la bilanco por eldoni* **Don Kiĥoto** *(bindita en tualo, en unu sola volumo de 670 paĝoj, kun bildoj, je 2 500 kopioj) entutas ĉirkaŭ miliono de pesetoj, la Fundacio devigas sin alporti la monon necesan venigi la projekton al realigo (ĝustas starigi ĉi tie la finan subtenon ekonomian de Victor Ortiz, kiu signifis verdan lumon por la libro), tiel, ke post kvar monatoj, proksimume, tio, kio nur antaŭ kelkaj semajnoj ŝajnis nerealigebla sonĝo, estos bonega realo, ĉar la materialo jam estas en la printejo, kaj post kelkaj tagoj komencos mi korekti la unuajn galeprovaĵojn.*

*Kiam vi decidu, ke la momento oportuna jam venis, vi povas transsendi al mia ŝparkonto nº 3604-25, de la Ŝparkaso de Saragoso, Aragón y Rioja, Agencia Urbana 14, Strato Azoque nº 37-39, Saragoso, la kvanton interkonsentitan kiel salajron mian kiel tradukiston. Decidu vi libere la momenton, kiam vi faros tion. Ĉiel, tiu ĉi sumo restos en mia konto, kaj mi redonos al vi, se pro ia ajn kialo neantaŭvidita* **Don Kiĥoto** *ne eldoniĝos.*

*Mi, kiu estas persono vorita de skeptikeco, atestis kun vera miro kiel via gesto de sindono pafigis fenomenon de imitado kaj entuziasmo, specon de ebrieco, kiu rememorigis min pri tio, ke* frenezulo faras centon *(mi petas por mi esti la unua frenezulo en tiu ĉi afero), samtempe al tio, ke mia fido en homoj komencis disŝiri je la unua fojo en mia vivo.*

*Tio ĉi estis por mi gravega sperto, pri kiu iam mi verkos profunde, pro tio, ke ĝi influos en mia filozofio praktika kaj en mia metafiziko.*

*Mi kredis vivi en dezerto de nekomprenemo, ĉasante ĥimerojn, kaj, kvankam mi daŭre kredas same, konstati, ke mi ne estas sola, igas min repaciĝi al mia dezerto kaj mia ĥimero, kaj eĉ senti min feliĉa pri ambaŭ.*

*Vi faris por mi pli ol ebligi la eldonadon de* **Don Kiĥoto***, kaj mi sekve estas duoble dankema al vi. Ne per danko protokola kaj formala, lipeksteren, sed per tiu danko de tiu, kiu ricevas sperton vivan nesuspektitan.*

*Transdonu ankaŭ mian agnoskon al via estimata edzino, kaj mi esperas baldaŭ komuniki denove kun vi por aktualiĝi pri la marŝo de nia* **Don Kiĥoto.**

*Ricevu brakumon de via amiko,*

***F. de Diego***


*P/D.- Mi pretigis skizon por la mencio, kiun la libro havos. Ĝi estas tiu:*

*La apero de* **Don Kiĥoto** *en la internacia lingvo ŝuldiĝas al la mecenateco (kaj idealismo) de la familio Manteca-Cano (kaj al ties fervoro por la hispana kaj esperanta kulturoj).*

*Bonvolu, ŝanĝu tion, kion vi trovos konvena, kaj sciigu min por redakti la definitivan tekston.*

*Patrocinada esta edición por la familia MC.*

*Tiu ĉi eldono estis patronita de familio MC.*



# La Faraono, Ĉapitro 18-a.

De l' tago, kiam li fariĝis vic-reĝo de Malsupra Egipto, komenciĝis por Ramzes vivo tre laciga, kian li tute ne atendis, kvankam li naskiĝis kaj kreskis en la reĝa kortego.

Oni simple tiranis lin, kaj liaj ekzekutistoj estis vizitantoj de ĉiuj specoj kaj rangoj.



Jam en la unua tago, vidante la hom-amason, kiuj puŝante unu alian nevole piedpremis liajn herbejojn, rompis liajn arbojn, eĉ difektis la ĉirkaŭmuron, la kronprinco postulis soldatajn gvardistojn por sia domo. Sed en la tria tago li devis forkuri el sia domo, en la kastelon, kies multenombraj gardistoj kaj precipe altaj muroj malfaciligis la eniron.

En la daŭro de la dekado antaŭ la forveturo Ramzes vidis reprezentantojn de la tuta Egipto se ne de la tuta tiama mondo.

En la komenco oni enlasis la grandajn. Venis por lin saluti: ĉefepiskopoj, ministroj, ambasadoroj feniciaj, grekaj, hebreaj, asiriaj, nubiaj, -eĉ iliajn kostumojn li ne povis ekmemori. Poste venis estroj de la najbaraj nomesoj, juĝistoj, skribistoj, supraj oficiroj de la Memfisa korpuso kaj bienposedantoj.

Ĉi tiuj homoj postulis nenion, ili esprimis nur sian ĝojon. Sed la princo, aŭskultante ilin de la mateno ĝis la tagmezo kaj de la tagmezo ĝis la vespero, sentis kapturnon kaj tremon en ĉiuj membroj.

Poste venis kun donacoj reprezentantoj de pli malaltaj klasoj: komercistoj kun oro, sukceno, eksterlandaj teksaĵoj, parfumoj kaj fruktoj. Poste bankieroj kaj pruntedonantoj por procentoj. Poste arĥitektoj kun planoj de novaj konstruaĵoj, skulptistoj kun projektoj de statuoj kaj plataj skulptaĵoj, ŝtonistoj, fabrikantoj de argilaj vazoj, lignaĵistoj ordinaraj kaj artaj, forĝistoj, fandistoj, tanistoj, vinberkulturistoj, teksistoj, eĉ paraŝitoj, kiuj malfermadis la korpojn de l' mortintoj.

Ankoraŭ ne estis finita la procesio de la honorantoj, kiam venis armeo da petantoj. Invalidoj, vidvinoj kaj orfoj de l' oficiroj postulis pension; nobelaj sinjoroj -kortegajn oficojn por la filoj. Inĝenieroj alportis projektojn de novaj metodoj de l' irigacio, kuracistoj rimedojn kontraŭ ĉiuj malsanoj, antaŭdiristoj- horoskopojn. Parencoj de malliberuloj prezentis petojn pri malgrandigo de la puno, kondamnitoj al la morto- pri pardono, malsanuloj petis, ke la kronprinco tuŝu ilin aŭ donu al ili sian sputon.

Sin prezentis fine belaj virinoj kaj patrinoj de belaj filinoj, humile, sed trude petante, ke la kronprinco akceptu ilin en sian domon. Kelkaj difinis la altecon de la postulata salajro, rekomendis sian virgecon kaj siajn talentojn.

Post dektaga rigardado de novaj personoj kaj vizaĝoj, post dektaga aŭskultado de petoj, kiujn kontentigi povus nur la riĉaĵoj de la tuta mondo kaj la dia potenco, la princo estis konzumita. Li ne povis dormi, estis tiel ekscitema, ke la zumo de l' muŝo kolerigis lin kaj dum momentoj li ne komprenis, kion oni parolis al li.

En ĉi tiu okazo Herhor ree helpis lin. Al la potenculoj li ordonis diri, ke la princo ne akceptas plu, kaj kontraŭ la popolo, kiu atendis malgraŭ la admonoj al disiro, li sendis taĉmenton

de l' nubiaj soldatoj kun bastonoj. Ili sukcesis multe pli facile ol Ramzes, kontentigi la homan avidecon. Antaŭ kiam pasis unu horo, la petantoj malaperis de l' placo, kaj multaj dum kelke da tagoj metis kompresojn sur la kapon aŭ sur alian batitan parton de sia korpo.

Post ĉi tiu provo plenumi la vic-reĝan devon, la princo eksentis profundan malestimon al la homoj kaj fariĝis apatia.

Du tagojn li kuŝis sur la kanapo kun la manoj sub la kapo, senpense rigardante la plafonon. Li ne miris plu, ke lia pia patro pasigas la tempon antaŭ la altaroj de l' dioj, sed ne povis kompreni, kiel Herhor sukcesas plenumi tiom da aferoj, kiuj kiel fulmotondro ne nur superas la homajn fortojn, sed eĉ povas lin frakasi.

—Kiel alkonduki al la triumfo niajn planojn, se amaso da petantoj ligas nian volon, manĝas niajn pensojn, trinkas nian sangon?... Post dek tagoj mi estas malsana, post unu jaro sendube mi malsaĝiĝus... En tiaj kondiĉoj oni povas fari neniajn projektojn, oni povas nur defendi sin kontraŭ la frenezo...

Li estis tiel timigita de sia senforteco sur la posteno de l' supera estro, ke li alvokis Herhoron kaj per ĝemanta voĉo rakontis al li sian ĉagrenon.

La ŝtata viro kun rideto aŭskultis la plendojn de la juna direktanto de la regna ŝipo, fine li diris:

—Ĉu vi scias, sinjoro, ke la grandegan palacon, en kiu ni loĝas, konstruis unu sola arĥitekto, Senebi, kiu cetere mortis ne fininte ĝin. Kaj certe vi komprenos, kiel ĉi tiu eterne vivanta arĥitekto povis plenumi sian planon, neniam laciĝante kaj ĉiam konservante gajan humoron?

—Mi volus scii...

—Li mem ne faris ĉion; li ne hakis la trabojn kaj la ŝtonojn, ne faris la brikojn, ne portis ilin sur la trabaĵon, ne metis ilin unu sur alia, ne cementis. Li nur desegnis la planon, eĉ por tio li havis helpantojn.

Kontraŭe vi, princo, volas mem ĉion plenumi, mem aŭskulti kaj aranĝi ĉiujn aferojn. Tio superas la homajn fortojn.

—Kiel mi povis fari alie, se inter la petantoj estis maljuste kondamnitaj aŭ ne rekompencitaj laŭ la meritoj? La fundamento de l' ŝtato ja estas la justeco— respondis la kronprinco.

—Kiom da homoj vi povas aŭskulti dum unu tago, sen laciĝo?— demandis Herhor.

—Dudek, ne pli multe...

—Vi estas tre feliĉa. Mi aŭskultas maksimume ses aŭ dek, sed tio ne estas petantoj, ili estas la grandaj skribistoj, intendantoj kaj ministroj. Ĉiu el ili raportas al mi ne detalojn, sed plej gravajn aferojn pri la armeo, faraonaj bienoj, religiaj aferoj, tribunaloj, movoj de Nilo. Ili ne alportas al mi bagatelojn, ĉar ĉiu el ili, antaŭ la alveno al mi, devis aŭskulti dekon da malsuperaj skribistoj. Ĉiu skribisto kaj ĉiu intendanto malsupera kolektis novaĵojn de deko da subintendantoj kaj subskribistoj, kaj tiuj siavice de dek malsuperaj oficistoj.

Tiamaniere mi kaj lia sankteco, parolante nur kun dek homoj ĉiutage, konas plej gravajn novaĵojn de cent mil punktoj de la lando kaj de l' mondo.

La gardisto, kiu gardas parton de la strato en Memfiso, vidas nur kelke da domoj. La dekestro konas la tutan straton, la centestro -parton de la urbo, la urbestro- la tutan urbon, kaj la faraono estas super ili ĉiuj, kvazaŭ sur la plej alta pilono de la templo de Ptah kaj vidas ne nur Memfison, sed ankaŭ la urbojn: Soĥem, On, Ĥeraŭ, Turra, Tetani, ilian ĉirkaŭaĵon kaj pecon de la okcidenta dezerto.

Daŭrigos venontnumere...








# 65a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



EL PUIG Valencio, de la 21a ĝis la 25a de Julio, 2006









Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.
ISSN 1697-6460